

Claude Gacond kun Michel Frésard: UEA en 1935, Robert Kreuz.

Radioprelego de Claude GACOND, SRI, 1985 decembro 07.

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-158/Radiokasedo-158-B-986-1985-86-Claude-GACOND-Michel-Fresard-UEA-en-1935-Robert-Kreuz.mp3>

Cl.- Parolas Claude Gacond kaj Michel Frésard nome de Svisa Radio Internacia.

Ni daŭrigu nian esploradon koncerne la esperanto-vivon antaŭ 50 jaroj.

M.- Tiu historia studo tutcerte helpas nin pli bone kompreni la hodiaŭajn karakterizaĵojn de nia movado. Ni do rigardas al 1a jaro 1935, kiun karakterizas la firmiĝo de la diktaturaj reĝimoj en Germanio kaj Italio kaj 1e renaskiĝo de naciismaj ŝovinismoj en la aliaj landoj. La ekonomia krizo kondukas la landojn al izoliĝemo kaj al malfido rearmiga. Tre verŝajne tiu rezigno je la idealo pacema, kiu naskis Ligon de Nacioj, ankaŭ influos la sintenon de la esperantistoj.

Cl.- Jes, kun la financaj malfacilaĵoj, kiuj fakte detruas la fundamenton mem de Universala Esperanto-Asocio, akriĝas konflikto, kiu ĉiam latentis en la esperanto-movado. Hector HODLER fondis en 1908 ne internacian sed universalan esperanto-asocion, tio estas organizaĵo al kiu oni individue aliĝas. Sed ekzistas forta tendenco, kiu sopiris al internacia statuso, tio estas, ke la aliĝoj eblu nur tra la kanalo de la naciaj esperanto-societoj. Paralele al la refortiĝo de la naciismoj en la politika vivo, refortiĝas la internaciisma tendenco ankaŭ en la esperanto-movado.

M.- Fakte, Hector HODLER, kiu mortis en 1920, restas vivanta spirita forto nur en Svislando.

Cl.- Jes, forto kiu esprimiĝas per la voĉoj de ĉefe tri homoj, ĉiuj svisaj: Eduard STETTLER, Edmond PRIVAT kaj Hans JAKOB, kiuj estas respektive prezidanto, redaktoro kaj direktoro de UEA. Tiun triopon apogos nesvisoj, kiel Andreo CSEH, inĝeniero Isbrücker kaj aliaj.

M.- La esperantistoj verŝajne deziris vidi estraron pli internacian.

Cl.- Tio estas nedubebla fakto. Universalan Esperanto-Asocion iniciatis fakte ĝenevanoj, kaj ĝis 1934 ĝi restis ĝenev-centrisma, des pli ke en tiu ĉi urbo ekzistis ekde 1919 la sidejo de Ligo de Nacioj. La sindonemaj ĝenevaj esperantistoj ne sufiĉe frue sentis la bezonon formi pli universalan laborgrupon, alvokante al si aktivulojn el aliaj landoj.

M.- Vi diris 'ĝis 1934'. Tio signifas, ke tiu ĝeneva centrismo ĉesis antaŭ 51 jaroj.

Cl.- Fakte jes. En la 26-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu disvolviĝis en Stokholmo, Edmond Privat kaj lia amiko Andreo Cseh ne estis reelektitaj, kaj pro tio la prezidanto de UEA, Eduard STETTLER kaj la direktoro de UEA, Hans JAKOB proteste demisiis. Tial elektiĝos tute nova estraro sen svisoj. Okaze de pasinta elsendo, ni jam diris, ke transprenis la prezidantecon de UEA la franca eksĝeneralo Louis BASTIEN, tre kapabla organizanto kaj renoma esperantisto. Kaj lin ĉirkaŭis same kompetentaj kaj renomaj esperantistoj el preskaŭ tuta Eŭropo.

M.- Ni rememorigu tiujn ĉi nomojn.

Cl.- En pasintaj elsendoj ni jam prezentis la personecon de Louis BASTIEN, do la UEA prezidanto, de la nederlanda inĝeniero Isbrücker kaj de la germana bankisto Vogt, kiuj estis

vicprezidantoj. Tion ĉi ni faris laŭtleĝante tre bone dokumentitajn artikolojn aperintajn en la revuo ESPERANTO, kies nova redaktoro estis la germano [Robert KREUZ](#), kiu estis samtempe la nova direktoro de UEA.

M.- Ĉu li ne mortis la postan jaron?

Cl.- Jes. Apenaŭ unu jaron li povos plenumi sian funkcion de direktoro, redaktoro kaj, ni diru, ĉionfarulo en la Centra Oficejo de UEA en Ĝenevo. Antaŭ ol legi la artikolon, kiu prezentas lin al la legantoj de ESPERANTO, ni rememorigu la nomojn de la aliaj estraranoj de UEA. La ĉeĥo Kamaryt estis lica profesoro kaj filozofo, la svedo Malmgren afergvidanto de kooperativo domasocio, la italo Orengo estis inĝeniero kaj la aŭstro Steiner direktoro de la Internacia Esperanto-Muzeo kaj registara konsilisto.

M.- Vere internacia estraro.

Cl.- Kaj eksterordinaraj personecoj. Malofte la estraro de UEA kunigis tiom da altranguloj. Bedaŭrinde ĝia prezidanto Louis BASTIEN estis tro urĝema en sia reformemo de la asocio kaj kiel bona franco, ne sciis fari kompromison. Li kondukis la esperanto-socion al skismo.

M.- Ĉu akcelos tiun ĉi evoluon la tro rapida morto de Robert Kreuz?

Cl.- Jes, tutcerte, kaj ankaŭ la tro multekosta svisa franko. Sed pri tio ni parolos en venonta elsendo. Hodiaŭ vi eble laŭtleĝu la informojn, kiujn la revuo ESPERANTO donis pri la direktoro Robert KREUZ en junio 1935:

M.- Tiu artikolo diras: "S-ro Robert KREUZ naskiĝis en 1894 en Mainz ĉe Rejno kiel filo de ŝip-kapitano. Dum parto de sia juneco li vivis en Nederlando kaj Belgujo. Post la lerneja vizito en Germanujo li eniris la komercon kaj industrion. Li faris rapidan kaj brilan karieron, estante post la milito sekcia ĉefo en oficejo de granda metalprilabora uzino en Frankfurt am Main. Li faris studojn pri komerca tekniko, ekonomiaj problemoj kaj reklama scienco. Li dediĉis sin fervore al studo de fremdaj lingvoj romanaj kaj ĝermanaj. Lia ekstrema lerteco pri parola traduko el kelkaj ceflingvoj estas fame konata. Li ankaŭ okupiĝis pri ekster-eŭropaj lingvoj. Post sia esperantiĝo li lernis Idon kaj studis aliajn helplingvoprojektojn. Li estas perfekta stenografo plurlingva. En niaj universalaj kongresoj li kutime stenografas la ĉefajn paroladojn. Li havas vastajn interesojn pri literaturo, scienco kaj praktika organizado. Li aperigis plurajn originalajn verkojn kaj tradukojn en Esperanto. Li estas konata kiel rimarkinda oratoro.

Cl.- Kaj sekvas informoj pri lia esperantisteco:

M.- Robert KREUZ fariĝis esperantisto en vintro 1908-1909. Li aliĝis al UEA en 1911. Ĝis 1914 li apartenis al la plej elstaraj laborantoj en Sudokcidenta Germanlando. Ĉe la militfino li reaktiviĝis tuj en la sama teritorio kaj en Rejnlando. En 1923 Robert Kreuz fariĝis profesia esperantisto. Unue, li estis direktanto de la Esperanto-fako de la firmao Teo Jung en Horrem kaj redaktoro de Esperanto Triumfonta, la antaŭulo de Heroldo de Esperanto. En 1924 li estis vokita de la tiam prezidanto de UEA, D-ro Privat, al Ĝenevo, kiel sekretario de la universalaj kongresoj kaj konferencoj. En 1930 li ricevis la titolon de Direktoro.

Cl.- Tiu tre kapabla homo estis eksterordinare dika, kio ne malfavoris lian eksterordinaran dinamismon, sed tutcerte estis malfavora al lia sanstato.

M.- La venontan semajnon ni prezentos la personecon de la estraranoj Orengo kaj Steiner.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude GAGOND kaj Michel FRESARD diras al vi : Ĝis la venonta sabato!

*Kopirajto © Claude GACOND www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), januaro 2014*